

PENSEO

N-ro 264

okt. / 2013

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



maro artefarita

el larmoj subteraj
pupoj faras maron kolorplenan.
en ĝi fiŝoj peklitaj huraas
prenante bombojn por bombonoj.



maturiĝo


ŝultrante la kanonon, en aero
iam mi ĉasis stelojn kaj vampirojn.
manante la bastonon, sur la tero
nun mi serĉas fungojn kaj lampirojn.



vokado

tro da semoj svarmas pinte de la arbo,
preter kiu sataj birdoj flugas.

kapjesado vokas la horloĝon.
vekiĝu, destinita hokĉifonistino!



feliĉa fino

ĉasante riĉon, sola li falis
en subteran palacon orplenan.
sen akvo, manĝante tiujn perlojn,
li mortis sur la korpo de princino.



Mori (Usono)



Hura

Maljuna vulpo
Juna lupo
kune decidis ataki
kaj disŝiri ŝafon
jam vunditan
por alte teni
la standardon de Moralo
en ĝangalo!
Tuj aliĝis ankaŭ la oportunista

ŝakalo!
Jen perfekte justa batalo
por alta moralo!
HURA!



Cezar (Germanujo)



Mia animo estas kiel limonado en glaso

Mia animo estas kiel limonado en glaso,
do tre fuĝema io.

La sapvezikoj estas miaj pensoj kaj revoj,
kiuj svarmas kape kaj celas supreniĝi.

Kelkaj el ili fariĝas ŝprucaĵoj,
ekzemple iaj poemoj, karesvortoj
aŭ fotideoj aŭ grumbloj
aŭ babilado nenidira.

Aliaj servas al pli
praktikaj celoj.

La fino de mia animo
estos en ĉiu kazo malpleneco
laŭ trinkita limonado el glaso,
aŭ pro manko de ideoj,
aŭ devigita pro mia
transmondiĝo.

Iel mi disrompiĝos
kaj certe finiĝos en rubujo,
nomata urno aŭ tombejo
aŭ maro, aŭ kiel ajn.

Transmonde de mia animo
atendos min la nenio,
kiu certe estos
tre beata stato.



Jadranka Miric (Serbujo)



Aŭgusta sunsubiro

(hajke)

Jen Aŭgusto, ci,
flaviĝas foliaro.
Surstrate, ĉe mi .

Aŭgusta ĉiel',
kiel ekflamanta sun'
dum sunsubiro.

Ardas koloroj
Jen, suno okcidente
furioziĝas.

Paŭlo Silas (Brazilo)




POEMVERKISTO KIU VOLAS VIVI

Ekstremece alternas en vidofero
Senerara daŭreco de vivoformoj
Kaj kultur' limigita de jaroj ŝtormaj.
Neniigas majeston ajneca verso.

La Malkovro apenaŭ agitas, pelas
Al magia pluiro la homkreemon,
Pordofrapas longbraka figur' malbela
Por ĝin ĵeti en freŝan edenĝardenon.

Vivoarb' alifoje altiras ravan dubon.
Ĉu kaduka moment' maljunula? Kiel bubo
Ekmeditas pri perdo de memkontrolo.

Menskapablo baraktas tuj apud aŭguro.
Kvietiĝu! Atingis vin mortohoro,
Kies voĉ' antaŭdiras baldaŭan teruron.



Petro Palivoda (Ukrainio)



Paruo

Sin premis malgranda paruo
al mia fenestro.
Estaĵo vivanta ĉiam
bezonas varmon.
Sed kiel mi vin defendos,
naiva birdeto?
Frostiĝas mi mem pro doloro
simile al birdo vundita.



Disiro

Rigardo al suno similas
je paŝo ĝis vesperiĝo
trankvilo malvarma
brakumas ŝultrojn
vi diras ke ne ekzistas
Lando de Revoj Matenaj
diru kie mi vivu



Urbo

mi rememoras
inter kvar okuloj

ankoraŭ unu paŝo
kaj perdiĝos
en strataj krucvortegoj
mi por ĉiam
miksiĝos kun malvarma
homamaso
eniros vin
kaj ne revenos



Siv Burell (Svedujo)



Dormi tro longe

Subite ekvekinte
estis je la sepa
La buso nun foririnte
mi preskaŭ ploris
Vekhorloĝo ne sonoris.
Akordigi ĝin, eble mi forgesis
Per telefono mi konfesis
al mia laborej'
ke mi tro longe dormis
Sed – « aŭtomata » voĉo diris
« Ni fermas je la kvara ».
Ho, kia mirinda konsol'
mi dancis kiel trol'
Estis je la deknaŭa, ne la sepa
estis vespero, ne mateno
Tiel iris, kiam mi dormetis
pigran aprilan dimanĉon
sed certe havis mi bonŝancon
ĝis mateno mi redormetis.



Evandro Caboclo (Brazilo)

POEMO POR LA MONDO

Pensu pri homaro
Kiel familio
Preĝu ĉiutage
Al nia bona Dio

Pensu pri fremdulo
Kiel nia frato
Pensu en tuta mondo
Kiel nia patrujo

Preĝu por la homoj
Kiu ne havas amon
Zorgu la infanon
Kiu restas sur la strato

Fariĝu voluntulo
Por iu nobla idealo
Preĝu kaj laboru
Por pli bona mondo

Rodolfo Scianmarell (1927-1973)



Ĉiuj avidas pli

(kanteksto)

Ĉiuj avidas pli, ĉiuj avidas pli.
ĉiuj avidas pli, pli kaj pli, kaj multe pli...
Pli volas malriĉul', riĉulo multe pli
neniu kontentiĝas, ĉie regas ambici'.
Kiu havas eŭron volas havi du.
kiu kvin posedas, volas havi dek.
Kiu dudek havas, ja kvardek avidas.
Kiu havas kvindek nepre volas cent.

Kiu havas eŭron volas havi du. (koruso)
Kiu kvin posedas, volas havi dek. (koruso)

Kiu dudek havas, ja kvardek avidas. (koruso)
Kiu havas kvindek, nepre volas cent. (koruso)
Ĉiuj avidas pli, ĉiuj avidas pli,
ĉiuj avidas pli, pli kaj pli, kaj multe pli...
(koruso)

La mono estas nun la granda diktator'
sed nepre, ne forgesu, vere gravas nia kor'.

Kiu havas eŭron volas havi du.
Kiu kvin posedas, volas havi dek.
Kiu dudek havas, ja kvardek avidas.
Kiu havas kvindek, nepre volas cent.
Kiu havas eŭron, volas havi du (koruso)

Kiu havas kvin ja volas havi dek. (koruso)
Kiu dudek havas, ja kvardek avidas. (koruso)
Kiu havas kvindek, nepre volas cent (koruso)

La mono regas nin, ni ĉiuj volas pli
sed nepre, ne forgesu, vere gravas nia kor'.
sed nepre, ne forgesu, vere gravas nia kor'.
(koruso)

Esperantigis



Svena Dun (Hispanujo)

Jan Twardowski (1915-2006)




Nenio eternas

En daŭra movado
nenio eternas...
La lumo, la ombro
en la temp' alternas.
Post ĝojo komuna
la tristo-momentoj,
post rido - la tempo
de l' larmoj venenaj.
Estas pluvaj tagoj
kaj la tagoj sunaj,

printempaj kaj vintraj
kaj tiuj aŭtunaj.
Tiuj ĉi ŝanĝadoj
Al mi eĉ konvenas:
estas la principoj
de la viv' serena.

Esperantigis



Helna Tylipska (Italujo)

**Milosh Gjergj Nikolla- Migjeni
(1011-1938)**



*La poemo
pri la mizero*

Neenglutebla buŝpleno ja estas la mizero, mia
frato,
Buŝpleno restanta engorĝe kaj tristiganta,
Vidanta palajn vizaĝojn kaj verdiĝintajn
okulojn,
Rigardantaj kiel ombroj kaj etendantaj siajn
malviglajn manojn.

Kaj tiel etendataj plurestas malantaŭ mi
La tutan vivon ĝismorte.

Kaj super ili, en aero, kvazaŭ mokece,
Tranĉas la ĉielon la ŝtonaj krucoj kaj
minaretoj,

La profetoj kaj sanktuloj brilas per
multkoloraj vestoj.

Kaj la mizero envere sentas perfidecon.

La mizero havas sian malbelan stampon;
Estas ĝi abomeninda, malbona, hontinda;
La ties frunto, la esprimigaj okuloj,
La lipoj envane kaŝi klopodantaj

Estas ja la infanoj de nescio kaj oferaĵoj de la
malestimo,

La malpuraj postrestaĵoj ĉirkaŭ la tablo

Sur kiu jam vespermanĝis malkompatebla
hundo

Kun jarcenta ventro, ĉiam malsatebla.

La mizero ŝancon ne havas. Sed havas nur
ĉifonaĵojn,

Ĉifonaĵojn de kapo ĝis fundo, flagojn de
espero

Disŝirita kaj dispecigita senrenverse.

La mizero furioziĝas pro lasciva amoro.

En mallumaj anguloj, kune kun hundoj, katoj,
musoj,

Sur ŝimaj, malpuraj, malsekaj matoj,
Nudiĝas la karnoj, kiel velkaĵojn; flavaj kaj
malpuraj;

Interplektiĝas la sentoj per bestia forto.

Mordas, formanĝas, absorbiĝas, interkisiĝas la
sekiĝintaj lipoj

Estingiĝas la malsato, kaj malpliĝas la soifo

En la alkaptita volupto, kiam sufokiĝas la
memo.

Kaj tie konceptiĝas la frenezuloj, servutuloj
kaj la almozuloj

Kiuj morgaŭ naskiĝos por plenigi la stratojn.

La mizero en la okullumeto ĉe la etulo

Tremas kiel la flambrilo senforta de la kandelo
Sub la fumigita plafono plene de araneoj,

Kie homombroj tremas sur muroj
plenmakulitaj,

Kie la malsana bebo ploras kiel malbonanimo
Suĉante la elĉerpitajn mamojn de la povra
patrino,

Kiu denove graveda, malbenas Dion kaj
Diablon,

Malbenas sian idon, malbenas pezan ŝarĝon.

Ŝia bebo ne ridas, nur kadukas,

La patrino ne amas, sed nur malbenas.

Kiom trista ja estas la lulilo de la malriĉeco
Kie la bebon lulas la larmoj kaj la furiozaĵoj!

La mizero kreskigas la bebon subombre de la
domoj

Altaj, kie apenaŭ atingas la voĉo de
almozularo,

Kie oni ne povas detrui la trankvilon al la
sinjoroj

Kiam ili dormas kun siaj sinjorinoj en la litoj
de feliĉeco.

La mizero maturigas la infanon antaŭ ol li
viriĝu;

Volas instrui lin kiel eskapi la manpugnon
minacantan,

Tiun manpugnon kiu strangolas lin engorĝe
dumdorme

Kiam komenciĝas la febraj deliroj pro
malsato

Kaj la vizaĝon de la infano kovras la ombro de
la morto,

Fatala ornamaĵo anstataŭ la rideto.

Frukto maturita estas sciite kien ĝi iras
Samtiel ankaŭ la infano en la tera ventro
finiĝas.

La mizero laboras, laboras tagnokte
bolante la ŝvito surbruste kaj surfrunte,
Malpuriĝante ĝisgenue en la koto
kaj denove la intestoj pro malsato falfaldiĝas.

Ridinda rekompenco! Por centunu pasio
Potage nur: Frankoj tri-kvar kaj “marŝ!”

La mizero iamfoje havas lustrajn vangojn,
Lipojn akritajn, kolorigitajn vangopintojn,
la korpon- memorigilon de fikomerco,

Destinita enlitiĝi kun alia ulo;
Kaj por tiu servo perlaboros kelkajn frankojn
Sur litkovriloj, sur vizaĝoj kaj en la konscio

makulojn.

La mizero ankaŭ lasas heredaĵon
Ne en la bankoj nek nemoveblaĵoj,
Sed la malrektiĝintajn ostojn kaj enbruste iun
doloraĵon,

Povas lasi kiel memoraĵon la iaman tagon
Kiam forfalis la doma tegmento
Pro la tempa putrigado, pro la ĉiela pezo,

Kiam sur ĉio sentiĝis terura voĉo
Plene de malbeno kaj preĝo kvazaŭ el la infera
fundo,

Estis la homa voĉo mortante subtrabe.

Tiel sub la pezaj piedoj de la rabia dio
Mortas laŭ pastro tiu vivinta perfortinte.

Kaj per tiuj memoraĵoj, ĉi tiuj malfeliĉaĵoj
Ĝispleniĝas la venena glaso dum heredado de
generacioj.

La mizero havas konsolan fratinton la glason.
En la rancaj drinkejoj, ĉe la tablo plene de
malpuraĵoj
Abomenaj, soifanta animo enverŝas la glason
En la gorgon por forgesi naŭdeknaŭ zorgojn.

Kaj la turbula glaso, la diableca glaso
Karesante pinĉas kiel la serpento
Kaj la homo falante, kiel la tritiko de la serpo
Subtable plor-ridas je tragediforme.

Ĉiujn zorgojn la malriĉeco sufokigas per la
glaso
Kiam centon da ili enverŝas unu post alia en la
gorgon.

La mizero ekbruligas la dezirojn kiel la
mallumo la stelojn
Kaj fumigas kiel arbojn karbigas la fulmo.

La mizero ne havas ĝojon, sed nur doloraĵojn,

Neelteneblajn doloraĵojn frenezigitajn,
Donantaj la ŝnuron por ke vi mem pendigu
Aŭ iĝu povra oferaĵo de la paraĝrafoj.

La mizero apenaŭ volas kompaton. Ĝi volas
nur juston!
Kompaton? Bastarda filino de la ruzaj patroj,
Kiuj pompe samkiel la fariseoj
Tamburas per vulpecaj sentoj
Alĵetante al la almozulo moneron maldikan
sur la manplato.

La mizero estas ne forviŝebla makulo
Surfrunte de la homaro pasanta dum la
jarcentoj
Kaj ĉi tiun makulon neniam eblas
Forstreki la ŝvabriloj ŝimitaj en la temploj.
Enesperantigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

Mikrorakonto

Ĝjang Liman (Ĉinujo)

Nokta renkontiĝo

Nokto profundigis. La stratlampoj ĉiuj
estingiĝis dummomente.

Taksiisto, kiu deĵoris nokte, vagigis la
aŭton de strato al strato.

Senatente li veturis al vojkruciĝo.

Subite li vidis seksallogan virinon kun
flirtanta vestaĵo el muslino.

Ŝi alproksimiĝis, ŝajne mansvingante por
veturo, sed sen videbla intenco por haltigi la
aŭton.

Rigardante ŝian duonkaŝitan korpon, la
ŝoforo intence malrapidigis la aŭton kaj lante
alproksimiĝis al ŝi.

Oh, la virino vere svingis sian manon,
signante, ke ŝi volas preni taksion.

Saluton! Bonvole enaŭtiĝu! La ŝoforo
haltigis la aŭton, por ke ŝi enaŭtiĝu.

Senparola ŝi eniris kaj demetinte la
mansaketon, apogis sin al la aŭta vando, ŝajne
elĉerpita.

Pere de la retrospegulo, li vidis ŝiajn
longajn harojn kaj alte elstarajn mamojn.

La aŭto malpeze tangis antaŭen. Ŝiaj
mamoj skuiĝis kaj gratis lian koron.

Tuj li eksentis sangon bolanta kaj
trakuranta la korpon.

Ŝi malrapide rektigis sian korpon kaj
premis sin al la dorsa flanko de la ŝofora
sidloko. Kokete ŝi movis sin senĉese, ke li ne
povis sin teni je la allogo.

Ŝi ekridetis, ŝajne signante, ke li haltu por
malstreĉi sin momenton.

Li brulis de avideco kaj haltigis la aŭton.
Ŝi memvole demetis la surveston el muslino
kaj montris siajn grandajn kaj blankajn
mamojn.

Li neniel povis sin reteni plu kaj,
transmovante la sidlokon, sin ĵetis al...

La sekvan tagon la loka televidstacio raportis,
ke, pro tragika morto de taksisto en sovaĝejo,
la polico faras enketon, ke nuntempe la kaŭzo
de la morto ankoraŭ ne klariĝas.

Elĉinigis **Eto (Ĉinujo)**

Huo He (Ĉinujo)

Erudicia Muso

Post plurlara legado de libroj, muso fariĝis
tiel fieraĉa, ke ĝi nek estimis aliajn musojn
nek donis eĉ ekrigardon al katoj.

Iutage la muso estis kaptita de kato, tamen
ĝi ankoraŭ orgojle diris al la kato: “Vi ne
rajtas min formanĝi, ĉar mi estas la plej
erudicia muso en la mondo.”

Sed la kato pli firme stringis ĝin per siaj fortaj ungegoj kaj respondis: “Mi nepre formangos vin ĝuste pro via erudicio.”



Elĉinigis



Verdeca (Ĉinujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



FOIRO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Foiro
la popola fest’.
La jara renkontiĝo.
Tradicia manifest’.
Kapo en tempest’.

Karusel’
je infana ĝoj’.
La vivo sur kvarradoj...
Kun luno super la voj’.
Ja, al ĉiu ĝoj’!

Aŭtejo.
Brua konkuro.
Ludil’ kiel premio.
Kurado al la turo,
ludoj per ŝnuro!

Jen, urso
ekster la domo.
Malantaŭ horordomo
la svingado ĝis vomo.
Ho, homo, homo!.

Bazaro.
Kaso malplena.
Malgraŭ tiom da homoj.
Sub tendo kantas lena.
Aŭdiĝas “/magda/lena”.



*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Vejdo (Ĉinujo)



Vojaĝe ĉirkaŭ Insulo Phuket*

—laŭ ĉinesko Jiangnanchun**

Briletas
mar-lazur’
en vasta spaco.
Ondetoj kun pur’
ruliĝas jen leĝere
jen saltetas kun plezur’.

La jakto
je rapid’
kuras antaŭen
plena je ĝojrid’
kaj tangas kaj balancas
kvazaŭ ĉevalo sen brid’.

Videblas
sur la blu’

nigraj punktetoj—
insuloj kun bru'
de naĝantoj sur plaĝo
ĉase ludantaj kun ĝu'.

Juninoj
en bikin'
krias kokete
je gapa fascin'
de viroj amavidaj
amsoifaj kun sangvin'.

Sur plaĝo
kuŝas jen
lacaj naĝantoj
aŭ svarm' en promen'
trankvilpaŝas senĝene
vere kun kora seren'.

Pelate
de vento
velŝipoj kuras
jen per frekvento
kvazaŭ blankaj nuberoj
sur blua firmamento.

Rondŝvebas
la mevoj
ĉirkaŭ nia ŝip',
kvazaŭe revoj
niaj ondus muare
per mallevoj kaj levoj.

Smeralda
la gemo
alproksimiĝas—
verda poemo—
kovrita de arbustoj
l' insulo en bril-tremo.

Kvazaŭ song'
blublua
la rondvojaĝo
animoskua

restos en nia memor'
kiel impres' plenĝua.
21-09-2013



**situante sude de Tajlando, Insulo Phuket famas pro sia maraj pitoreskejoj.*

***Jiangnanchun (Printempo sude de rivero): ĉina fiksfirma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)*

Lily (Ĉinujo)

Pretigu vin, kara!

—laŭ ĉinesko Fengrusong*

1.

pretigu vin, la sinjor',
diru kun fervor'
al mi mielajn vortojn
ĉe l' orel'
per manlabor'
palpu miajn mamojn
por ekcita humor'

jam bategas mia kor'
dum ĉi tiu hor'
malsekiĝas mia pub'
duras jam mia klitor'
pretigu vin, kara,
por ekstaza amor'!

2.

mi soifas kun pasi'
je am-iluzi'
brakumu min tre stringe
jen sur min
per energi'
knedu mian karnon

ĝis erota ebri'

jam nun vin pretigu vi
preskaŭ sen konsci'
mi ja nereteneble
ĝoj-ĝemas en agoni'
enŝovu vin en min
por piŝtada seri'



**Fengrusong (Vento inter pinoj): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)*

Maupassant (1850-1893)



La anstataŭanto

– S-ino Bonderŭo, ĉu?
– Jes, s-ino Bonderŭo.
– Ne eblas!
– Tion - mi - diras - al - vi.
– S-ino Bonderŭo, la maljuna sinjorino kun ŝiaj puntokufoj, la devotulino, la sanktulino, la honorinda s-ino Bonderŭo kies malgrandaj lanugaj kaj falsaj haroj aspektas algluitaj ĉirkaŭ la kranio, ĉu?
– Ŝi mem.
– Ho ! Sed vi frenezas!
– Tion - mi - ĵuras - al - vi.
– Tiam diru detale al mi la aferon.
– Jen. En la tempo de s-ro Bonderŭo, la eksnotario, s-ino Bonderŭo utiligis, tion oni diras, la aktistojn de sia edzo por sia aparta

servo. Ŝi estis unu el tiuj burĝinoj kun sekretaj malvirtoj kaj neflekseblaj principoj, kiel multe ekzistas. Ŝi amis la belajn virojn ; kio estas pli natura? Ĉu ni ne amas la belajn virinojn?

Kiam s-ro Bonderŭo mortis, la vidvino ekvivis kiel kvieta kaj neriproĉebla rentulino. Ŝi asidue vizitis la preĝejon, disdegne parolis pri proksimuloj kaj donis nenian motivon diri pri si.

Poste ŝi maljuniĝis, ŝi fariĝis la malgranda ulino, kiun vi konas, rigida, acida, malica.

Nu, jen la neverŝajna aventuro, kiu okazis en la lasta ĵaŭdo:

Mia amiko Johano de Anglemaro estas, vi ja scias, dragonkapitano, enkazernigita en la ĉirkaŭurbo de Riveto.

Alvenante pasintan matenon al la kvartiro, li eksciis, ke du homoj el sia roto abomene pugnobatalis. La leĝoj de la milita honoro estas severaj. Duelo okazis. Post la afero, la soldatoj reamikiĝis unu la alian, kaj pridemanditaj de sia oficiro, ili rakontis la kialon de sia kverelo. Ili interbatiĝis pro s-ino Bonderŭo.

– Ho!

– Jes, mia amiko, pro s-ino Bonderŭo...

Sed mi donas la parolon al la kavaleriano Sibalo:

– Jen la afero, mia kapitano. Tio okazis antaŭ ĉirkaŭ dek ok monatojn, mi promenis sur la korso, inter je la sesa kaj la sepa vespere, kiam iu virino alpaŝis min.

Ŝi diris al mi, kvazaŭ ŝi demandus al mi sian vojon:

– Militisto, ĉu vi volas honeste gajni dek frankojn ĉiusemajne?

Mi sincere respondis al ŝi:

– Mi ĝojus servi al vi, sinjorino.

Tiam ŝi diris al mi:

– Venu al mi morgaŭ, je tagmezo. Mi estas s-ino Bonderŭo, mi loĝas en la numero 6 de la strato Tranĉeo.

– Mi nepre venos, sinjorino, estu trankvila.

Poste ŝi forlasis min kun kontenta mieno kaj aldiris:

– Mi tre dankas vin, militisto.

– Estas mi, kiu devas danki vin, sinjorino.

Tio ne ĉesis taŭzeti min ĝis la sekva tago.

En tagmezo mi sonorigis ĉe ŝia pordo.

Ŝi mem venis por malfermi la pordon. Ŝi havis surkape amason da malgrandaj rubandoj.

– Ni rapidu, ŝi diris, ĉar mia servistino povus reveni.

Mi respondis:

– Mi ja volas hasti. Sed kion mi devas fari?

Tiam ŝi ekridis kaj vigle respondis:

– Ĉu vi ne komprenas, granda stultulo?

Mi ne komprenis, mia kapitano, honorparolo.

Ŝi alpaŝis, sidiĝis tute apud mi kaj diris al mi:

– Se vi rediris nur unu vorton pri tio, mi enkarcerigos vin. Ĵuru ke vi estos muta.

Mi ĵuris ĉion, kion ŝi volis. Sed mi daŭre ne komprenis. Mia frunto ŝvitis. Tiam mi demetis mian kaskon, en kiu troviĝis mia naztuko. Ŝi ekprenis ĝin, kaj viŝis al mi la tempioharojn. Poste... jen ŝi brakumas min, kaj flustras en mian orelon:

– Tiam, vi ja volas, ĉu?

Mi respondis:

– Mi ja volas tion, kion vi volas, sinjorino, pro ke mi venis por tio.

Tiam ŝi senvuale komprenigis tion, kion ŝi volis per klaraj agoj. Kiam mi kaptis pri kio temis, mi demetis mian kaskon sur seĝon, kaj montris al ŝi, ke la dragonoj neniam regresas, mia kapitano.

Ne estas ke la farenaĵo tre plaĉis al mi, ĉar la ulino ne estas plu en sia unua freŝeco. Sed en nia metio, oni ne devas sin montri tro

postulema konsiderante, ke la mono malofte venas. Kaj krom tio oni havas la familion, kiun ni devas subteni. Mi diris al mi: "Tio faros cent soldojn por la patro."

Kiam la tedaĵo estis farita, mia kapitano, mi preparis min adiaŭi la sinjorinon. Ŝi ja volus, ke mi ne foriru tiel rapide. Sed mi diris al ŝi:

– Mi bedaŭras, sinjorino, sed al ĉiu laŭ sia ŝuldo. Unu glaseto de drinkaĵo kostas du soldojn, kaj du glasetoj valoras kvar soldojn.

Ŝi bone komprenis la rezonadon, kaj ŝi metis en la fundon de mia mano etan napoleonan ormoneron je dek malnovaj frankoj. Tio ne multe plaĉis al mi, ĉar tiu monero povas perdiĝi en la poŝo, kaj kiam la pantalonoj ne estas bone kudritaj, oni retrovas ĝin en la botoj, aŭ ankoraŭ oni tute ne retrovas ĝin.



Pentrita de Igorj Ĥomjakov (Rusio)

Dum mi rigardis tiun malfreŝan maljunulinon dirante tion al mi, ŝi rigardadas al mi, ruĝigas, kaj ŝi trompiĝas pri mi, kaj ŝi demandas al mi:

– Ĉu vi trovas, ke tio ne sufiĉas?

Mi respondas al ŝi:

– Ne estas precize tio, sinjorino, sed se tio ne farus nenion al vi, mi preferus du monerojn je cent soldoj.

Ŝi donis ilin al mi, kaj mi foriris.

